

LA VERDA LUPEO

25a jarkolekto



14(93) INFORMILO DE ELF-AREK JUNIO 1993

Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im BdPh eV



8~A UK 1912 EN KRAKOVO



Prof. d-ro Odo Bujwid

Prezidanto de tiu UK




Dekora PK

Glumarkoj






La unua E-Stampo



LETERO DE LA REDAKTORO


Hodiaŭ estas la 26-a de aprilo 1993 kaj mi "fermas" la manuskripton. Mi nun sendas ĝin al nia Hirsch. Li devas la tuton retajpi, plaĉe kiel ĉiam, aranĝi la tekstojn, aldoni reproduktaĵojn, denove resendi al mi pro korektado, presigi, enkovertigi, adresi kaj ekspedi. Certe granda laboro. Li meritas nian dankon! Dume mi nun pakas miajn kofrojn, fiksas mian tendo-ĉaron al mia aŭtomobilo kaj veturas kun



mia edzino al nia somera restadejo. Ĝi situas rekte apud la fjordo de Kiel (Norda Germanio). Tio ne malhelpu vin, sendi al mi informojn al mia ĝisnuna adreso. Ili atingos min kun nur iometa malfruiĝo. En tre urĝaj kazoj vi povas peri viajn aferojn telefone al Hirsch, li ilin telefone peros al mi. Tagon poste mi havus vian mesaĝon. Denove mi dankas al ĉiuj tiuj fidelaj geamikoj, kiuj aktive helpas al mi per alsendo de materialoj kaj informoj. En la venonta LVL vi trovos tiujn informojn, kiujn nun ne eblis publikigi. Al ĉiuj mi deziras belajn somerajn tagojn. Al la vizitontoj de nia ELF-AREK-kunveno dum la ĉi-jara UK en Valencio mi deziras agrablan kunestadon. Ĝis la...via

Rudolf [signature]

EKSPOZICOJ KAJ NI





E-filatela ekpozaĵo en Centra Pekino


Dum 50 tagoj, ekde la 15a decembro 1992 videblis en la montrofenestroj de Pekina Xi-PM-Kompanio tiu ekspozaĵo. Patronis ĝin la PM - Kompanio, la Pekina E-Asocio kaj la Muzeo Guo Muro. Tiun ekpozaĵon kompilis nia Ĉin Kajĝi. Kompreneble, ke miloj da, eble eĉ dekmiloj(?), homoj estis atentigitaj pri Esperanto, eksciis pri Zamenhof, pri elstaraj sciencistoj-simpatiantoj de Esperanto kaj ankaŭ pri la E-movado en Ĉinio. Gratulon al ĈKĜ kaj dankon pro la senditaj informoj.
(sur la bildo maldekstre: s-ino Guo Pingying, meze: nia ĈKĜ kaj maldekstre: s-ro Wu Yi, direktoro de la Xiau-a PM-Kompanio. Li jam kelkfoje ordonis uzon de poŝta stampilo kun E-tekstoj)

Piton en SULBRAPEX de Sao Paulo.

Li ricevis en tiu sudbrazila fila-ekspo vermajlan medalon. Tiu rajtigas lin ekspozi venontjare en nacia klaso kiel plenkreskulo. Persone li estis tie kaj litie faris utilajn kontaktojn kun kolektantoj kaj komercistoj. Dankon pro la senditaj informoj, afiŝo kaj poŝtkarto.

Belucci en itala Nacia Fila-Ekspo 93

Nia Alessandro Belucci kun sia E-filatela ekspozaĵo partoprenis en la PRAPHILEX`93 en la itala urbo Prato. Li ricevis arĝentan medalon



(unuafoje). Korajn gratulojn!!

E-filatela ekspo dum la 67-a SAT-kongreso 1994.

Nia Vlada Hasala informis, ke kadre de la venontjara SAT-kongreso, 16 - 23 07 1994 en Straĵnice (Ĉeĥio), okazos E-filatela ekspozicio. Ĉiuj niaj ekspozantoj estas invitataj, partopreni per ekspozaĵo(j). La ekspozaĵoj devas posedi medalon el filatela ekspozicio. Anoncu vin por partopreni ĉe Hasala. Li certe sendos plurajn informojn. La intencon mi trovas laŭdinda. Almenaŭ la kongresanoj do havos eblecon, informiĝi pri la eblecoj de la Esperanto-filatelio. Mi proponas, okazigi ankaŭ E-filatelan kunvenon en la kadro de tiu kongreso. Eble eĉ iu el ni pretas, konstrui ekspozaĵon pri la laborista E-movado.

Certe la prepara komitato ankoraŭ informos pri la kondiĉoj de la partopreno, amplekso de ekspozaĵo, asekuro, dogana proceduro, kostoj po kadro kaj ĉu la ĉeĥa filatelista asocio patronas ĝin. Laŭ informo ja okazos "Tutmonda" ekspo.

Stráĵnice situas 30 km oriente de la aŭtostrato Brno-Bratislava ĉe Hodonin (Breclav) sur la limo inter Slovakio kaj Ĉeĥio. La urbeto havas 7000 enloĝantojn kaj dum la pasintaj jaroj ofte gastigis E-konferencojn kaj -seminariojn.

KLUBANOJ SURVOJE



E-filatela lumbild-prelego en Londono (GB).

Komence de 1993 Hans Jankowski (D) faris en la la Londona E-Klubo lumbild-prelegon pri la E-filatelio. Dankon pro la senditaj informoj al li!

Piton en Ribeirao Preta.

En Januaro 1993 okazis tie la loka E-Kongreso kun 120 E-istoj. Nia Piton faris lumbild-prelegon pri la E-filatelio kaj havis grandan sukceson kun publika elmontro de sia ekspozaĵo en la enirejo de la kongresejo. Pri tiu elmontro dik-kaj grandlitere informis amase disvastigita afiŝo. Kara Piton: Gratulon pro via aktiva kunlaboro en nia Esperantujo.

NI-EN ALIAJ GAZETOJ

Terttu Österman en la finna "ABOPHIL".

En la finna "ABOPHIL" aperis de nia Terttu Österman du-paĝa ilustrita artikolo sub la titolo: "Mia tema ekspozaĵo - Oni povas paroli kaj kolekti Esperanton". La finnlingvan tekston finigas la frazo en Esperanto: "Esperanto-kolektado estas ĝoja afero".



La foto pri la 5-strio de Bavario pleje impresis min. En ĝi aperas sin alternante 3 "Brauer" (bierfaristo)-talonoj kun du "Esperanto-talonoj. Ilin apudas po du 5 fenigaj pm kaj tute blanka marko. Impona, pompa kaj absolute tre rara peco. Krona juvelo en Esperanto-filatela-ekspozaĵo.

Gratulon pro via artikolo kaj koran dankon pro la sendita informo kun kopio.


Jean Amouroux en la franca "La Philatelie Francaise.

Kontinue nia Amouroux daŭrigas la "Esperanto-paĝojn" en tiu franca filatela ĵurnalo. Laste kun multaj interesaj sciigoj pri Archdeacon, kiu estis en la frua Esperanto-periodo elstara figuro. Nelaste pro lia granda populareco en Francio kiel flugpioniro.

Korajn salutojn al vi, s-ro Amouroux kaj: Dankon!!

Rimarko de Hirsch:
Bedaŭrinde, ke neniam aperas E-traduko de tiuj artikoloj. La enhavo estas vere interesa, sed ne nur por franclingvanoj.

STAMPOJ



La ĉina sistemo de stampoj.

Poŝtan stampon nur faras PT-oficejoj kaj PM-Kompanioj. Lokaj filatelaj ligoj estas gvidataj de PT-oficejoj kaj tial "duonoficialaj". Mi ne komprenis, kion signifas: "duonoficialeco". E-filatelaj Ligoj ne estas ligitaj al PT-oficejoj kaj tial ili estas "neoficialaj".

Se iu loko filatela ligo produktas stampilon, ĝi ne estas poŝta. (En Ĉinio ekzistas multegaj tiaj nepoŝtaj stampiloj, inter ili ankaŭ pluraj E-tekstaj-stampiloj).

ZLR skribis, ke eblas proponi al PT-oficejo E-stampilon kaj ja ofte kun sukceso. Tamen la stampilo ne kostas monor Al mi ne estas konata iu alia lando, kie memora stampilo estas senpaga.

La poŝtaj oficejoj komisias grafikistojn, desegni la stampojn kaj kovertojn. La grafikistoj ricevas por tiu laboro honorarion. En Ĉinio nia amiko ZLR grafikas la plej multajn E-stampilojn. Apud li estas aliaj Esperantistoj, kiuj jam grafikis E-stampojn por lokaj poŝtejoj. Jam ege malofte estas fuŝproduktoj, kiujn oni povas trovi inter

la stampoj de 1987/88/89. Bedaŭrinde ĉiam denove aperas en nia LVL informoj pri nepoŝtaj stampoj. Sed ja eblas ĉiam korekti en postas numero, danke al la atentemo de korektaj ĉinaj E-filatelistoj.

En la kazo de Haikou (eble) neniu proponis uzadon de E-stampiloj, la tiea PT-oficejo de si mem petas nian ZLR, desegni la "unuatagajn" E-stampojn. En la pasinteco ni maljunaj E-istoj sufiĉe laŭte postulis "E en la praktikon". Nun oni tion tie praktikas. Se tiu afableco de la Haikou PT-oficejo disvastiĝos tra Ĉinio, tiam certe ne plu eblos esti "kompleta" (jam nun ne!).

TJ 22 du ĝis nun nekonataj stampoj



TJ 22-I

Zhuhai

Nia ZLR sendis kopiojn de ĝis nun ne konataj stampoj de nia TJ 22 (100 jaroj E.) La originalojn posedas la al ni nekonata Sheng Shucu.
Uzitaj en: Zhuhai kaj Shaoguan de la provinco Guangdong. Se vi ankoraŭ ne faris, bv. aldoni ankaŭ: Taishan (kataloga suplemento 1992) Ankaŭ tiu nur poste konatiĝis. Ni jam skribis pri tio.



T 22-J

Shaoguan

TJ 1992 - 42 Stonaj Gravurajoj (Haikou)



Haikou 1992 dec 15. Teksto:

LA ŜTONAJ GRAVURAĴO EL QINGTIAN

Bildo: besto figuro. Desegnis: ZLR
Uzita de la PM-Kompanio Haikou (Hainan)

TJ 1992 - 43 Go-a Tongrun Pokalo (Changshu).



Changshu: 1992 12 24. Teksto:

"LA 4-A GOA KONKURSO POR GO-REGO DE TONGRUN - POKALO".

Desegnis: ZLR. Info: ĈKĜ. Bildo: Go-ludo
Uzita en: Changshu-a PTO.

TJ 1993 - 01 Filatelo - Changshu.



Changshu 1993 jan 01. Teksto en Esperanto:

FILATELO kaj en la ĉina:
MEMORIGO PRO TRANSLOGIGO DE CHANGSHU-A FILATELA ASOCIO KAJ CHANGSU-A POŜTMARKA KOMPANIO AL NOVA DOMO:

Desegnis: ZLR. Uzita de Changshu-a PTO.
Info: ZLR kaj ĈKĜ.

TJ 1993 - 02 Koka Jaro (Changji)

Changji: 1993 jan 05. Teksto:

LA KOKA JARO, sama ankaŭ en la ĉina kaj araba ŝkriboj (ujgura?).
Bildo: vira koko. Desegnis: nekonata?. Info de ĈKĜ. Uzita de: ??









TJ 93-2 昌吉 TJ 93-3 常熟 TJ 93-4 海口 TJ 93-5 马鞍山

TJ 93 - 3 Koka Jaro (Changshu)

Changshu 1993 jan 05. Teskto: LA KOKA JARO. Desegnis: ZLR, bildo: kokviro rigardas dekstren. Info de ZLR kaj ĈKG. Samtage aperis 2 pm por la "Koka Jaro". La stampo do estas "Unuataga Stampo".

TJ 1993 - 4 Koka Jaro (Haikou)

Haikou 1993 jan 05. Teksto: LA KOKA JARO. Desegnis: ZLR. Bildo: kokviro kun vizaĝo maldekstren. Kokvira vosto multe pli pompa ol tiu de la Changshu-a virkoko.

TJ 1993 - 5 KOKA JARO (Ma`anshan)

Ma´anshan 1993 jan 5. Teksto: LA KOKA JARO. Desegnis: ZLR. Bildo: Kokviro rigardas maldekstren. Info de ĈKG. Uzita de PM-Kompanio (?).



Rekomendite sendita letero al la Pekina adreso de la redaktoro kun la kompleta pm-serio "Song Qingling" 1993-2.

TJ 1993 - 6 Song Qingling (Beijing)

1993 jan 27. Beijing. Tekstò: LA 100-A DATREVENO DE LA NASKIĜO DE SONG QINGLING; HONORA PREZIDANTO DE LA ĈINA POPOLA RESPUBLIKO. (En Esperanto kaj en la ĉina lingvo). Bildo en la stampo: portreto, koro kun ĉina mapo, sur ĝi manskribitaj ideogramoj de Zhou Enlai: "Batali por Nova Ĉinio", titolo de la verko, skribita de Song Qingling. Ĉirkaŭ la koro flugas dek kolomboj, signifantaj ŝian 100-an naskiĝdatrevenon. Desegnis: Xie Shaoxing. Uzita de la Pekina Xiqu-a PM-Kompanio. Ekzistas kun normalaj datstampoj de la 20-a (pm-eldontago) kaj 27-a januaro (naskiĝdato).

S-ino Song Qingling estis la edzino de Sun Yat-sen. En Ĉinio ŝi estas fama kaj tre ŝatata persono. Sur la UTK legeblas, ke ŝi estas laŭdata kiel unu el la plej grandaj virinoj en la 20-a jarcento. Ŝi havis bonan amikecon kun la ĉinaj Esperanto-pioniroj: Hujucz kaj Cai Yuanpei. Al ŝiaj bonaj amikoj ankaŭ apartenis Cuo Moruo kaj Lusin.

1993 jan 20 aperis pri ŝi pm-serio 1993-2 (2 pm) en Ĉinio. Dankon al nia Ĉin Kajĝi pro la senditaj informoj kaj originale senditaj poŝtaĵoj... Estis li, kiu en Pekino iniciatis tiun stampon.

TJ 1993 - 7 Song Qingling (Haikou)



Haikou 1993 jan 20. Teksto: LA 100 JAROJ DE LA NASKIĜO DE SONG QINGLING: Bildo: portreto. Desegnis: ZLR. Uzita de Haikou-a PM-Kompanio Info de ZLR.

Ekzistas private farita dekora koverto.

TJ 1993 - 8 Song Qingling (Lanzhou)

Lanzhou 1993 jan 20. Teksto: LA 100-A DATREVENO DE LA NASKIĜO DE SONG QINGLING: Desegnis: Guo Jongquan. Info: ĈKĜ. Bildo portreto (bildo de la stampo sekvos en la venonta LVL)

TJ 1993 - 9 Kamelo (Haikou)



Haikou 1993 feb 20. Teksto: LA SOVAĜA KAMELO (J): Bildo: Kamelo. Desegnis: ZLR. Info: ZLR. Uzita de PM-Kompanio Haikou (Hainan).

F - 59 maŝinvarbstampo el St. Raphael.

St. Raphael, 19-3-1993. Teksto: Congrès de la Fèdération de ESPERANTO-LANGUE INTERNATIONALE ST:RAPHAEL 15/16 MAI 1993.



Dankon pro la alsendo de la informo al nia Amouroux.

F - 60 maŝinvarbstampo de Herouville.



La 48-a kongreso de SAT-amikaro okazis de la 9a - 13a de aprilo 1993 en la franca urbo Herounville (St Clair).
Ekde la 15-a de januaro 1993 funkciis tie la maŝinvarbstampo kun la tp: CONGRES-ESPERANTO - Herouville- 9-13 Avril 93.

La informon sendis ankaŭ nia Amouroux, dankon.

H - 124 Vintra Esperantista Ferio en Budpest.

Budapest, 31 12 1992. Teksto: VINTRA ESPERANTISTA FERIO. Bildo: kamenpurigisto kun porko sur la brakoj.



Informis: Stefan Fekete, multan dankon.
Ekzistas sambilda dekora poŝtkarto. Pli ampleksa informo pri ĝi fuĝis el mia manuskripto por la LVL 94. Mi petas pardonon.

L a s t m i n u t e r i c e v i t a

H - 125 Antaŭ 75-jaroj la unua hungara E-SST



Budapest, 1993 aprilo 13. Teksto en la hungara kaj E-lingvoj:

75- JARA LA UNUA ESPERANTO POŜTSTAMPO: (vd. la bildon).

Detalojn legu en la venonta LVL.

Dankon al nia Fekete pro la informoj!

I - 49 Itala stampo al ekspozicio (??).



Apude ni montras kopion de poŝta stampo el Cisterna de Lataina kun rilato al Esperanto.

Teksto: "c f u - L`ESPERANTO DELLA FILATELIA".


I-4012 Cisterna de Latina (LT): 23-1-1993)

Pri kio temas, mi ne scias, certe en la venonta numero de LVL ni informos pri detaloj.Dankon al nia Hirsch, kiu sendis la stampon.

AFRANKSTAMPOJ







AF pri la komuna Kongreso de ČEA kaj GEA.

Jen la plej nova AF el Straẑnice. En la lasta LVL mi profetis, ke la sekva AF venus el Slovakio (mi pensis, ke Stráẑnice situas en Slovakio), sed mi eraris. Eĉ ne venis el Ceĥio, sed kiel ĝis nun el CESKOSLOVENSKO (Ceĥoslovakio). Tion diras la valorstampo. Uzado ekde 01 marto 1993. La komuna kongreso okazas/is: 28-31.5.1993 en la banloko Karlovy Vary (Karlsbad). Intencita estas ankaŭ E-filatelista rendevuo, sed sciigo pri ĝi venis nur post apero de nia antaŭa LVL.
Rimarko de Hirsch: La kunveno de ELF-AREK-anoj okazis, sed ni raportos en la venonta LVL.



E-POŜTMARKOJ

Pri la sendentaj brazilaj E-pm.

Nia Piton nun skribis, ke la sendentaj estas provpresaĵoj. Antaŭ ne longe li akiris brunan provpresaĵon de la pm "ORA JUBILEO". Nun li trovis kvaronan folion (kun 17 pm kaj talono) de nedentumitaj presprovaĵoj, bluaj sur kartona papero. Krome ankaŭ ekzistas verda presprovaĵo sur dika kartona papero. Nia Piton pretas peri kontakton kun la posedanto de tiuj "presprovaĵoj", kiu vendas ilin. Kvarbloko kostas 75 US-$ en verda, bruna aŭ blua koloroj. La adreso por korespondado: Caixa Postal 1727, BR-13001-970 CAMPINAS SP...

Mi persone opinias, ke tiuj presprovaĵoj ne estas kolektindaj. Ni vivas en epoko de perfektaj kolor-kopiiloj. Estas bagatelaĵo, produkti paĝon de nedentumitaj markoj. Sciu, ke antaŭ deko de jaroj tiuj sendentaj estis apenaŭ troveblaj. Sed tio estas mia opinio. Mi nepre preferus havi normalan dentumitan pm sur "poŝte ekspedita"

koverto. Rimarko de Hirsch: Estus verŝajne tamen interesa, se mi publikigos en la katalogo pri tiuj "sendentaj" provpresaĵoj. Ĉefe tiu kvarona folio kun 17 pm kun talono estus interesa. Mi ne tute komprenas pri kio temas. Tial bv. sendu fotokopion kaj pli da detaloj pri la aliaj presprovaĵoj. La normala folio, laŭ mia informo, ja havas nur 12 pm kaj meze talonon.

Bavara (lando en Germanujo) pm kun talono.

Ĉi-tie devus sekvi artikolo pri la loko de tiu pm kun talono en tutaj folioj. Bedaŭrinde tiu afero ankoraŭ estas esplorenda. Ni publikigos ĝin en unu el la venontaj LVL.
Kiu havas foliajn partojn de tiu pm? Bv. sendu taŭgajn fotokopiojn al mi.

Hirsch

Kontrolmarkoj por pm-foliujoj.

En germana filatela ĵurnalo mi nun legis, ke tiuj kontrolmarkoj estas ŝatataj de specialaĵ-kolektantaj filatelistoj. Ni normalaj filatelistoj preskaŭ neniam povas vidi ilin, ĉar ili kutime malaperas en la poŝtejaj paperkorboj. Pri kio temas? La poŝtejo ricevas

500 Blocks
Sonderpostwertzeichen
„100 Jahre Esperanto"
zu **85** Pf = **425** M

Zur Beachtung!
Das Öffnen dieses Pakets, das Nachzählen und das Vergleichen des Inhalts mit der Aufschrift ist von zwei verantwortlichen Personen gemeinsam auszuführen. Bei Abweichungen ist sofort eine Verhandlung aufzunehmen die mit der Verpackung über die zuständige BWzVw an das Zentrale Post- und Fernmeldeverkehrsamt WzVtSt Leipzig, einzusenden ist. Wird hiernach nicht verfahren, so können Einwendungen gegen die Richtigkeit nicht anerkannt werden.
III 18 185

la pm (blokoj) en tutaj folioj kun po 50 (aŭ alikvante)pm (blokoj).

Tiuj folioj troviĝas en fermitaj kovertoj en diversaj kvantoj. Ĉe la koverto mankas triangulo kaj helpe de ĝi eblas nombri la foliojn en la koverto sen malfermi ĝin. Sigelitaj estas tiuj kovertoj per glueblaj kontrolmarkoj. Tiuj markoj havas surpresojn de: kvanto de folioj (blokoj), nominalo, motivo ktp. Mi siatempe akiris du paketojn kun po 500 GDR-E-blokoj. Hazarde mi ne forĵetis la kontrolmarkon de tiuj du paketoj kaj nun (eble) posedas filatelan raraĵon, se mi povas fidi al tiu informo en la prestiĝa germana filatela gazeto. Eble similaj kontrolmarkoj ekzistas ankaŭ en la poŝta servo de aliaj landoj. Kiu jam povas akiri tutan koverton kun 50 pm-folioj kun po 50 aŭ eĉ 100 pm. Mi tamen montras kopion al vi, ĉar temas pri interesa objekto.

Krome ekzistas....

Esperanto - sigeloj

Nia ĉina amiko Gao skribis: ...En Ĉinio ekzistas fama arto: "gravura skriba-maniero". Tio estas por ni Ĉinoj rava arto kaj la sigelo estas bona artaĵo por ni. Dum la Pacifika E-Kongreso la gravurartisto gravuris la sigelilojn en la kongresejo kaj sigelis por la kongresanoj. Certe tiuj sigeloj ankaŭ estas Esperantaĵoj kolektindaj. Mi sukcesis akiri tiujn 3:







1 Gravurita laŭ la ĉina antikva ĝuan-skribo-maniero. Teksto: "5-a Pacifika Kongreso de Esperanto 1992 ĉinio"

2 Gravuraĵo pri tiu kongreso de s-ro Cheng Hong.


3 Gravuraĵo ankaŭ el tiu kongreso..."

Dankon al nia Gao, kompreneble ni ankaŭ informas pri tiuj Esperantaĵoj, se atingas nin informoj pri ili.

FANTAZIAJOJ

La lokaj pm de "ATLANTIS kaj LEMURA

Jam en nia LVL no. 45 ni havis artikolon pri ĉi tiuj fantaziaj poŝtmarkoj. Ankaŭ nia ELF-AREK-Katalogo mallonge notas ilin. Nun alvenis de nia Hans Jankowski novaj informoj. Krome nia Hirsch ricevis la samajn informojn de brita ne-Espeantista poŝtmarkvendisto. Jankowski komence de 1993 legis en Londono artikolon pri tiuj fantaziaj pm en la angla pm-gazeto: "Stamp Magazine march 1993" kaj sendis kopion al mi. Mi bedaŭrinde ne regas la anglan lingvon.



En la letero ankaŭ estis belegaj koloraj kopioj de tiuj pm. Eble ĉi-foje ni sukcesos pli klarajn kopiojn ol en LVL no.45.

La valuto de la "Princlando Atlantis" (longitude 15°) estis la DALO. 1 D havis 100 skalojn kaj valoris duonan usonan dolaron. Iniciatis (laŭdire) la dana markapitano J.L. Mott. Li eĉ posedis pasporton de tiu Atlantis. Ekzistis ankaŭ monbiletoj! Entute interesa afero. Laŭ la artikolo ekzistas kovertoj poŝte ekspeditaj; afrankitaj per usonaj pm kaj aldonaj Atlantis-pm. Dankon pro la informoj al nia Jankowski!

Aldone:
La unuaj fundamentaj informoj troviĝis en la kongreslibro de la "23-a Usona Filatela Kongreso 1957" de Robert W. Murch. (paĝoj: 139-144). La unua projekto de tiu pm datas el la jaro 1934, la dua el la jaro 1935. En la jaro 1965 la frato de Ernest Hemingway (fama usona novelisto), Leicester Hemingway, proklamis la Republikon Atlantis. Atlantis estas laŭdire bambua arbaro en la grandeco de 8 x 30 futoj.







sendenta





Dekstre:
1a eldono





GLUMARKOJ





Sub tiu rubriko ni baldaŭ publikigos ŝanĝojn kaj aldonojn por nia glumark-katalogo, Ia kaj IIa partoj. Mankas ankoraŭ kelkaj detaloj.

Jen la lastaj informoj pri novaj glumarkoj:



①



②

③



④



(1)	1992-31-12	V E F, Budapest 37x44 gumita kaj mg, trĉ, bruna, ni kaj ve sur blanka Bildo: kamenpurigisto kun porko, E-stelo
(2)	1993-13-04	75-jara la unua (hungara) poŝtstampo (Budapest) ronda, mg, ve sur blanka, trĉ.
(3)	1993-28-31 05	Unua komuna kongreso de la Ĉeĥa kaj Germana E-Asocioj en Karlovy Vary (Karlsbad) mg, ni sur blanka, trĉ. Bildo: preĝejo en Karlovy Vary
(4)	1993-29-31 05	Sveda Esperanto-Kongreso en Uppsala 30x45, mg, verda sur blanka Bildo: la katedralo de Uppsala kaj E-stelo (Lastsekunda informo)

FAMAJ ESPERANTISTOJ





Marin Benka - Esperantisto (??)

Nia Elda Dörfler atentigis pri 2-Krona CS-pm kun portreto de Martin Benka. La pm aperis okaze de la "Tago de CS-pm- 19-12 1991".

Benka estis fama artisto, desegnis multajn pm (?) kaj bildkartojn. Inter ili ankaŭ plurajn E-bildkartojn. Eldonis tiujn la E-klubo en la slovaka urbo Martin. Kiu scias pli?

NUMISMATIKO



ESPERANTO - MEDALOJ

El Latvio

Nia Hans Jankowski pasintjare partoprenis la SAT-Kongreson en Litovio kaj tie trovis dekon da al li nekonataj medaloj. Ili estis faritaj de konata medalisto Janis Strupulis en bronzo.

Jankowski nun pretigas noveldonon de E-katalogo pri moneroj kaj medaloj. Interesuloj sin turnu al li!





100-jaroj Esperanto



Talivaldis Indra



Eduards Jaunvalks



Andreo Cseh



D-ro Zamenhof



Julio Baghy



Kolmano Kalocsay

El Litovio kaj Ruslando

En la "65-a KONGRESO de SAT - LITOVIO 1992" nia Jankowski akiris ceramikan medalon kun supre notita teksto. Li informis ankaŭ pri ricevo de bronza Zamenhof-Medalo kun pezo de 340 gramoj, farita 1987 en Moskvo. Sur la "antaŭa" flanko portreto de Zamenhof kun la teksto: AŬTORO DE ESPERANTO L.L. ZAMENHOF 1859 - 1917. La malantaŭa flanko montras E-stelon kaj al mi nekonatan tekston.
Dankon pro la informoj al nia Jankowski. (Bv. ŝanĝi mian adreson en via adresaro. Jam pli ol 1 jaro tiu malnova ne plu validas!)





A T E N T U - G R A V E - A T E N T U - G R A V E - A T E N T U

Sanĝu la germanajn poŝtkodnumerojn ekde 01 07 1993.

Samtempe forfalas la "W" kaj "O" post la "D" (por Germanio). Nepre tuj korektu en via adresaro tiujn numerojn, alikaze vi riskos egan malfruiĝon de via letero. La novajn poŝtkodnumerojn por Burmeister, Beau, Heimlich kaj Hirsch vi trovos sur la paĝo 16.
(Pro misuzo de nia adresaro por privataj kaj komercaj celoj aliajn adresojn ni ne publikigos. Viaj germanaj partneroj certe mem informos vin).

Finkalkulo 1992

(DM - konto)

Transpreno : 1.1.92		Bonhavo: 31.12.92	
Konto	820,46	Konto	2 005,50
Stampobanko	132,02	Stampobanko	13,25
plia enspezo	1 066,27	plia elspezo	---
	2 018,75		2 018,75

Enspezoj		Elspezoj	
Kotizoj	1 614,75	Ofica materialo	50,00
Stampobanko	3 813,43	Stampobanko	3 800,18
LVL	252,00	LVL	890,30
Katalogo	398,59	Katalogo	200,00
Donacoj	112,00	Afranko	183,99
Sumo	6 190,74	Sumo	5 124,47
Saldo plia elspezoj		Saldo plia enspezoj	1 066,27
Entuta sumo	6 190,74	Entuta sumo	6 190,74

(UEA-konto elfx-r)

Transpreno: 1.1.92	2 624,06	Bonhavo: 31.12.92	2 686,24
plia enspezo	62,18	plia elspezo	---
	2 686,24		2 686,24

Enspezoj		Elspezoj	
Kotizoj	150,18	UEA/UK	88,00
Sumo	150,18	Sumo	88,00
Saldo plia elspezoj	---	Saldo plia enspezoj	62,18
Entuta sumo	150,18	Entuta sumo	150,18

Mi tre kore dankas al la geamikoj Richard Hirsch kaj Werner Heimlich por iliaj tre ampleksaj laboroj rilate la stampobanko, la katalogservo kaj la tre intensa helpo en financaj aferoj. Nur dank al tiuj ambaŭ ni ne devis altigi la membrokostojn por 1993, kvankam la prez- kaj afrankkostoj altiĝis terure.
Certe en tiu statistiko ankoraŭ estas kelkaj truoj, ĉar ne ĉiuj membroj transĝiras la kotizon al mi au al UEA. Mi fakte konas la problemojn kaj kun la poŝtaj kostoj kaj kun la problemoj en orientaj landoj tamen ni bezonas monon por la plua eldono de nia LVL.

Rolf Beau, kasisto

KATALOGO
DE LA
ESPERANTO-FILATELIO

Ekde de 1989 ekzistas nova katalogo de nia fako en nebindita formo. Per eldono, en 1992, de la dua parto de la glumarkkatalogo, ĝi nun estas kompleta. Se necese, mi eldonos suplementojn, kiujn mi anoncos en nia organo LVL.

La katalogo enhavas jenajn partojn:

	DM	IRK
1 la specialajn E-temaj poŝtajn stampojn (Konsistas el: la stamptekstoj, la stampbildoj, la prezoj laŭ valorpunktoj, la afrank-stampoj kaj la IPA-stampoj.	25,--	15
2 la poŝtmarkojn (aldone: "krome ekzistas" kaj la poŝto dum la Ia kaj IIa mondmilitoj)	18,--	11
3 la glumarkkatalogon, nun ĝis 1992	30,--	18
4 la katalogon de ĉiuj ĝis nun konataj tutaĵoj (oficialaj, poŝtaj tutaĵoj, bildpoŝtkartoj, poŝtkartoj, kiuj havas poŝtmarkon, speciale eldonita por tiu tutaĵo, tutaĵoj, kiuj estis private menditaj ĉe la poŝtaj instancoj kaj tutaĵoj, kiuj havas privatan surpreson).	30,--	18

La kompleta katalogo kun ordigilo kostas: DM 105,-- 64 IRK.
La katalogaj partoj ankaŭ estas unuope riceveblaj.
Aldoniĝas la afrankkostoj.

Mendu ĉe:

Richard Hirsch, Lambertstr. 12, D-W-6430 Bad Hersfeld

Pagoj al: <u>Ĉekoj ne akceptotaj!!!</u>

Rolf Beau, Jacobstr. 9, D-O-7010 Leipzig

Konto: Sparkasse Leipzig
Bankkodo (BLZ): 860 555 92
Konto-No: 309 022 320

N I A K A S I S T O P A R O L A S ! ! !

****

Ne sendu ĉekojn!!

Pro la tre altaj bankkostoj, bonvolu ne sendi al ni ĉekojn!
Prefere pagu al la kontoj de nia kasisto:
- *Sparkasse Leipzig: 309022320; BGN: 860 555 92*
- *Poŝtĝiroficejo Nürnberg: 366737-855; BGN: 760 100 85*
- *UEA konto: Kodo rlfb-x*

****

Antau kelkaj semajnoj mi ricevis ĉekon de S-ro Nielsen por 21.-DM. La banko postulis 10.-DM kostoj ke mi ricevis nur 11.-DM!! Vere estas rabistoj. Certe ni devas altigi la kotizon ekde 1994 se la kostoj tiel evoluiĝas. Ja ne nur estas la bankoj kiuj volas pli kaj pli, ja ankaŭ estas la poŝto ktp.

C E T E R E ! ! !

Se vi trovos en tiu LVL koloran paperon, tiam bv. kontrolu, ĉu vi vere ankoraŭ ne pagis vian kotizon por la kuranta jaro.

Se vi jam pagis, tiam bv. informu nian kasiston kiam kaj al kiu konto vi ĝiris la monon.

Krome: Ĉu vi venos al la UK en Valencio? Tiam ne forgesu veni al la kunsido de ELF - AREK. Unu el la ĉefaj pritraktendaj punktoj estos la ebla altigo de niaj kotizoj pro altigo de afrankoj.

Membrostatistiko 1992








Komenco 1992	149 Membroj
eksiĝoj	4 "
aliĝoj	10 "
Fino 1992	155 Membroj

<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<<

Informilo de ELF-AREK
Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj
Offizielles Organ der ArGe Esperanto i. BdPh e.V.

Redakcio ĉe:	*Rudolf Burmeister, Max-Müller-Str.62 D-09123 Chemnitz*
Prezidanto:	*Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29 S-17144 Solna*
Kasisto:	*Rolf Beau, Jacobstr. 9 D-04105 Leipzig*
Banko:	Sparkasse Leipzig, Konto-No: 309 022 320 Bankkodnr(BLZ): 860 555 92
Stampobanko:	*Werner Heimlich, Fröbelstr. 4 D-29614 Soltau*
Kompostis+ ekspedis	*Richard Hirsch, Lambertstr. 12 D-36251 Bad Hersfeld*
Presado:	*Albert Oesterle, Hubertusstr. 28 D-85650 Wemding*